Esperanto Societo Frankfurto

Aprilo 2023

ESPERANTO-INFORMILO

Foto: A. Deutsch, en marto 2023
Kun printempaj kaj antaŭpaskaj salutoj

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Esperantujo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

La aprila eldono de la Esperanto-Informilo aperas kunredaktita de Georgo (GH) kaj Ulriko (UF). La redaktoteamo deziras bonan legadon.

Kolofono
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: Konrad Gramelspacher

Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main
www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender: Georg Hennemann
georg.hennemann@t-online.de
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Klub-Abende	Klub-vesperoj
Dienstag, d. 4. Apr. 23	**mardon, la 4-an de apr. 23**
19:00 h per Zoom	**19:00 h per Zoom**
Offene Sprachrunde	**Malferma babila rondo**
Dienstag, d. 11. Apr. 23	**mardon, la 11-an de apr. 23**
19:00 h per Zoom	**19:00 h per Zoom**
Geschlossene Sprachrunde (nur Mitglieder)	**Fermita babila rondo (nur klubanoj)**

Zoom-Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

surloke:

Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt

Dienstag, d. 18. Apr. 23	**mardon, la 18-an de apr. 23**
18:30 h surloke	
18:30 h **Sprachrunde:** G. Hennemann	**18:30 h** **Babila Rondo**: G. Hennemann
19:30 h **Vortrag:** G. Hennemann „Du musst dein Leben ändern“	**19:30 h** **Prelego:** G. Hennemann „Vi devas ŝanĝi vian vivon“

Naskiĝtagoj

En aprilo festos sian naskiĝtagon:

30.04 Ulrich Fellmann
30.04. Reza Torabi

Ni kore gratulas!

ESF-membrokunveno nun en Frankfurt Rödelheim

Bonvolu atenti la ŝanĝitan lokon de nia membrokunveno. La ESF-membrokunveno okazos kiel anoncite mardon, la 25-an de aprilo, sed nun en salono „Oprah“, Eschborner Landstrasse 42-50, 60489 Frankfurt Rödelheim.

mardon, la 25-an de apr,23
je la 19-a horo: **ESF-membrokunveno**
Frankfurt Westside, Eschborner Landstrasse 42-50, 60489 Frankfurt am Main

Vojeto en Guglo mapoj: https://goo.gl/maps/nxbU26SfLjf6XTdH8
Vidu ankaŭ la mapon sur la lasta paĝo
La domo “Eschborner Landstrasse 42-50“ situas 750m for de la S-Bahn stacio Rödelheim.
Voku saĝtelefon-numeron *0151-65191878* se vi ne tuj trovas la eniron.

Kerndatoj de la someraj ESF-eventoj:

- Sabado, 08.07.23 ESF ekskursas al urbeto Büdingen en la „Wetterau“ destrikto
- Sabado, 19.08.23 ESF Somera festo en Langenhain sur la areo de Bahaa komunumo

Pliaj detajloj por ambaŭ eventoj sekvos en la venonta EI

Secesioj – ĉu malbono de la nuntempa epoko ?

Opinia eseo de Georg Hennemann

En la historio de la homaro secesioj ĉiam denove kaj multofte okazis. Antaŭ cirkaŭ kvardek mil jaroj unua granda secesio komencis per grupo de homoj kiu rezignis la vivmanieron de nura ĉasado-kaj-kolektado favore al bredado-kaj-paŝtado de bestoj, kaj kvazaŭ samtempe kaj interrilate komencis la evoluigon de agrikulturo. En la sekvo de tio secesio de migranta al sesila vivkonduko la propra tereno kaj proprieto gajnis pli kaj pli da valoro.

Eble la plej grava secesio okazis antaŭ tri ĝis kvar mil jarojn, kiam la individua pensado evoluiĝis en diversaj pra-kristanaj kulturoj ene de singulaj individuoj, kiuj distingiĝis sin de la plimulto pro sia forta scienca aŭ emocia intelekto. Nuntempaj filosofoj kiel Peter Sloterdijk komparas tiun secesion kiel forlasi la vivriveron kaj naĝi al la bordo por elgrimpi la riverbordon, do forlasi la grandan amason kaj koncentriĝi je la propra memo aŭ egoo kaj bildigi propran kaj individuan personecon. Mi interpretas frazojn el la libro 'Vi devas ŝanĝi vian vivon', de P. Sloterdijk:

"*Tiu secesio de individuoj for de la homamaso nuntempe ne estas praktiko de unuaj intelektuloj aŭ tielnomataj profetoj, sed jam estas ekzercado de la plimulto, kaj la streso kaj humiligo separi sin de la amaso 'produktas' ja du ekstremajn polojn da elturniĝoj: unu grupo de homoj provas kompensi tiujn deprimojn kun spirita-heroa superkompensado, en kiuj la ŝajna aŭ vera fremdeco de la eksteraĵo devas esti vinkita per alianco de la interna kun la dieca spirito. Tiel faris ekzemple Herakliton en liaj triumfaj momentoj aŭ samtempe la hindoj dum la tempo de la Upaniŝad periodo.*

La aliaj grupo fuĝis en profundan deprimon, kvazaŭ tielmaniere, ke malnaĝi en la vivrivero estas klarigebla nur per funda propra kulpo. Tiu estas la pado kiun sekvis la malnova judaismo kaj kiun la kristanismo disvolviĝis ekstreme ĝis autovojojn."

La vorto secesio ni renkontas poste ankaŭ en la kunteksto de la artista movado je la fino de la 19-a jarcento. En la "fin de siècle" aŭ "Belle Èpoque" aŭ "dekadenco" nomita epoko estiĝis nova vivsperto kaj etiko inter artistoj, kiuj kaŭzis, ke precipe en eŭropaj urboj artistoj kaj pentristoj malakceptis la ĝistiaman 'ornamentitan' arton kaj disvolvis novan modelan arton bazitan sur simplaj formoj kaj geometrio. En Vieno oni eĉ ekkonstruis grandan palacon nomita "secesio" por eksponi kaj montri tiun novan arton.

Nun oni povas demandi sin ĉu la esperantistoj komence de la 20-a jarcento ankaŭ estis parto de la tiamaj secesiaj strebadoj? La internacia lingvo, kiu komence estis artistika lingvo uzante nur necesajn lingvoelementojn kaj forlasasante ĉiujn ornamentaĵojn de naciaj lingvoj ja promesis tute novajn spertojn kaj klarigojn. Tiuj homoj kiuj lernis kaj parolis internacie laŭ mia opinio ankaŭ povas esti nomata secesiuloj: Ili ja estis malkontenta kun la tiama lingva situacio kaj celis facilan tutmondan interkompreniĝon.

Nuntempe la vorto secesio bedaŭrinde estas uzata en tuta alia senco, nome en la senco de

separado de unu landparto aŭ regiono de la kernlando aŭ en la senco de separatista nacia strebado forlasi ekzistantan federacion. Parenteze ankaŭ inter bestoj secesioj okazas, sed tie la kialoj estas aliaj: Bestoj ja separas pro malsato aŭ pro seksa propagado, sed nur malofte pro teritoriaj konfliktoj aŭ tromulteco. Do kial homgrupoj volas separi sin de aliaj homgrupoj? En la homaro ekzistas multnombraj kialoj kiuj, sed la plej oftaj estas etnaj konfliktoj, populismaj aŭ naciismaj strebadoj, ekonomiaj kialoj, lingva aŭ religia-kultura situacio de subpremita malplimulto.

El la historio ni lernis ke separistaj strebadoj kun postaj secesioj povas kaŭzi penton, deprimon, humiligon, doloron kaj plejofte finas en perforto kaj milito. Ĉiukaze la foriganta homgrupo estas plejparte pli afektita ol la restanta.

En Europa ankoraŭ estas multe da subbrulaj konfliktoj pro separatismo kaj secesionistaj strebadoj. Kvankam en germanio la alvoko al perforta secesio estas malpermesita kaj la ago prijuĝita kiel ŝtatperfido (germane: Hochverrat), la „Bavaria partio“ (germane: Bayernpartei) en jaro 2016 plendis antaŭ la supera kortumo de germanio por aprobo, efektivigi secesian baloton nur en Bavarujo. La juĝistoj tiam decidis ke unu lando ne havas la rajton manipuli la konstitucion kaj pro tio ili decidis ne pritrakti la plendon, sed nenie en la germana juro la strebado al secesio estas fine kaj ĝisfunde regulita.
Ankaŭ la internacio juro ne estas tiel unuscenca rigarde al secesioj. Ŝajnas ekzisti deviantaj interpretadoj tiurilate inter la oriento kaj okzidento ene de la internacia juro.

Do ĉu naciaj secesioj celante aŭtonomion (germane: Abfall) estas nura rubajo kaj apartenas al la rubejo de la historio? Mi konvinkiĝas ke plejparte jes. Secesioj ne solvas iun ajn problemon sed ili daŭrigas nur la homaran interbatalon kaj celas en malĝusta horizonta direkto. La bonaj secesioj kontraŭe estas dirigita vertikala kaj celas plibonigi kaj evoluigi la humanecon.

Ligiloj:
https://en.wikibooks.org/wiki/Public_International_Law/Nature_and_Purpose_of_International_Law/Consent

Listo de la nuntempaj secesiaj strebadoj en Eŭropo
https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_derzeitiger_Sezessionsbestrebungen_in_Europa

tradukis Fritz-Ferdinand L. Palatinus (TF)

Pri la fortuno

eseo de Francis Bacon (1561-1626)

Oni ne povas kontesi, ke eksteraj cirkonstancoj multe kontribuas al la fortuno, kiel ekz. favoroj, okazoj, la morto de aliaj, aŭ hazardoj komplementaj al propraj virtumoj [malnova vorto por, pli malpli, laŭdindaj kapabloj]. Sed la esencan muldilon por la feliĉo de homo, tiun ri tamen tenas en sia propra mano. "Faber quisque fortunae suae" [t.e. ĉiu estas la forĝisto de sia bonŝanco], diras la poeto.

La plej ofta ekstera kaŭzumo troviĝas en tio, ke la stulteco de unu homo estas la bonŝanco por la alia. Ĉar nenio prosperigas la propan fortunon tiom subite kiel la misfaro de alia. "Serpens nisi serpentem comederit non fit draco" [la serpento ne povas fariĝi draco, se ĝi ne voras alian serpenton]

Evidentaj kaj klarvideblaj virtumoj elvokas laŭdon, sed estas la sekretaj kaj kaŝaj kvalitoj, kiu kondukas al la fortuno – certaj karakteraĵoj, kiuj portas en si la homo, kaj por kiuj ne ekzistas nomo. La hispana nocio "desemboltura" [senĝeneco] esprimas tion ere, ĉar se neniuj skrupuloj kaj neniuj renitaĵoj sin trovas en la naturo de homo, la radoj de ria racio povas samkuri kun la radoj de ria fortuno. Tial Livius diras (post kiam li priskribis na Cato la pli maljunan per la sekvaj vortoj: "In illo viro, tantum robur corporis et animi fuit, ut quocunque loco natus esset, fortunam sibi facturus videretur" [en tiu viro radikas tiom kverka forto de la korpo kaj de la menso, ke li, kie ajn li estus naskita, starigus sian fortunon], ke tiu posedis "fleksiĝeman menson".

Se oni akre kaj atente observas, oni ekkomprenas pri la fortuno; ĉar eĉ se tiu estas blinda, ĝi tamen ne estas nevidebla. La pado de la fortuno estas kiel la Lakta Vojo en la ĉielo, kiu estas renkontumo aŭ nodo de multaj malgrandaj steloj, kiuj unuope preskaŭ ne estas troveblaj, sed per ĝia kuneco tamen donas lumegon. Same jen ekzistas granda nombro de malgrandaj kej preskaŭ nevideblaj virtumoj, aŭ pli trafe: kapabloj kaj kutimoj, kiu portas al la homo la fortunon. La Italoj mencias kelkaj el ili, pri kiuj oni apenaŭ pensus. Se ili parolas pri iu, al kiu nenio malsukcesas, ili inter aliaj riaj proprecoj ankaŭ mencias, ke ri estas "poco di matto" [iomete da malsaĝulo].

Certe estas du el la pli bonsortigaj ecoj tiuj, ke oni havas en si iomete da malsaĝulo kaj ne tro multe da honoreco. Tial troaj adorantoj de sia lando aŭ siaj mastroj neniam estis fortunaj, ĉar tiu, kiu nur prikonsideras aliajn homojn, tiu ne povas iri sian propran vojon.

Subita fortuno faras la homon entreprenema kaj riskema (la francoj trafe nomas tiujn "entreprenant" kaj "remuant"), sed nur la singarde alproprigata fortuno estigas kapablan homon. La fortunon oni devas trakti kun honorigo kaj respekto, eĉ se tiel nur pro ĝiaj filinoj konfido kaj reputacio. Ĉar tiuj du naskas la fortunon: la unua en la homo mem, kaj la dua ekstere de, sed direktata al ri.

Ĉiuj saĝaj homoj, por ke homoj ne envias ilin pro tiuj, atribuas siajn proprajn virtojn al la providenco kaj fortuno, ĉar tiel ili povas pli bone akcepti tiujn; kaj krome atestas pri la grandeco de homo, se ri troviĝas sub la protekto de plialtaj potencoj. Tiel Cezaro dum tempesto diris al la ŝipstiristo: "Caesarem portas, et fortunam ejus" [Vi ŝoforas Cezaron kaj ties fortunon]. Tial Sulla ne sin atribuis per la kromnomo "la Granda" [magnus], se per "la Fortuna" [felix]. Krome montriĝis, ke tiuj, kiuj al si tro publike

atribuas multojn al siaj saĝeco kaj diplomateco, finiĝas malfortuna.
Estas skribita, ke por la Atenano Timoteo, post kiam li en siaj deklaroj al la ŝtato pri sia regado ofte enplektis " … ,kaj al tio la fortuno ne donis sian parton", poste nenion, kion li entreprenis, akompanis la fortuno.
Kompreneble ekzistas ankaŭ tiuj, kies fortuno estas kvazaŭ laŭ la versoj de Homero (kiuj posedas pli da eleganteco kaj malpezeco kiel la versoj de aliaj poetoj), tiel, kiel diras Plutarĥo pri la fortuno de Timoleono, kiam li ĝin komparis kun la fortuno de Agesilao kaj Epanimodo.
Kaj ke estas tiel, tio sendube je granda parto kaŭziĝas en la koncerna homo mem.


Antikva statuo de la diino Fortuna kun kornukopio kiel atributo

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Kial zumas la abeloj? - Ĉar ili ne konas la tekston.

Proverbo de la monato

La proverbo, kiun mi ĉifoje prezentas estas: „Kapuĉo monaĥon ne faras“.

Tiu proverbo facile kompreneblas. Necesas pli ol nura vestaĵo aŭ gesto por estiĝi klera kiel monaĥo. Se oni sajnigas sin pli klera aŭ saĝa ol oni fakte estas, tio baldaŭ estas eltrovita kaj oni ridingigas sin mem.

Enigmo(j) (sendita de Ulriko)

La last-ei-an enigmon solvos Ulriko en la venonta EI-o.
La demand estis: Kiu el la sekvaj vortoj ne apartenas al la tuta vortgrupo:

aerumi, agaco, akvomelono, baldakeno, barĉo, biero, bismuto, dando, eksplodi, Elizabeto, konscienco, lavango, lekcio, Ludovik', prujno, reprezenti, rezultato, Sofio, sofismo, vaflo
?

Nova enigmo:
Sinonimoj, homonimoj, nuancoj kaj ofte konfuzitaj vortoj (de Ulriko Felmano)
Sub tiu titolo okazis nia lingva rondo dum la lastmonata prelegokunveno. Ĉar la temo ŝajnas sufiĉe interesa, mi prezentas ĉi-tie la taskon de tiu vespero al ĉiuj de vi, kiuj ne povis partopreni, kaj al la partoprenintoj por recerbumi.
La tasko esti: kio estas la diferenco - se estas io - inter la sekvaj vortserioj?

gajni - venki
varbi - reklami
suno - stelo
luno - trabanto
fi - aĉ
iri – piediri - promeni - migri
babili - interparoli - konversacii
diri - informi - anonci
inteligenta - saĝa
koloro - farbo
efiko - efekto
proceso - procezo - procedo - proceduro
vorto - vortformo - signifo - nocio
signo - litero - skribsigno - simbolo - hanzio
akcidento - kraŝo - kunpuŝiĝo - kunpuŝo
kunveno - renkonto - renkontiĝo - mitingo
demonstracio - manifestacio
opinii - kredi
voli - intenci

Kaj provu solvi la jenan enigmon: klarigi, kio estas la diferenco inter
ruso - rusiano - rusujano,
Iro - irlandano.

Lasta paĝo

Finfine vi reagis al mia voko (de Ulriko Felmano)

Finfine!
Saluton!

Vi venis! Vi reagis! Sidiĝu!
Interesa trinkejo.

Jes. Unu de la plej aĝaj.
Ĉu.

Jes. Fondiĝis ankoraŭ en la lasta jarmilo.
Ĉu tiom longe!

Jes. En la mallonga ora tempo de freneza kapitalismo, kiam oni per komplikaj financaj produktoj, ĉenopcioj kaj monfuturaĵoj povis tranokte iĝi riĉegulo, kaj ĉio estis laŭleĝa kaj honora.
Nekredeble!

Kaj samtempe oni nenion faris kontraŭ la klimatofiaskiĝo, kvankam oni ĉion jam sciis.
Terure! Kiel homoj povis esti tiel? Ĉu oni vere jam sciis?

Jes. Jam cent jarojn antaŭe fakte kelkaj sciencistoj trovis la forcejgasefekton kaj kalkulis, ke la industriigo nepre okazigos konsideran temperaturan kreskon.
Kaj kiel la homoj reagis?

Ili plejmulte ne legis tiujn gazetojn.
Sed kiu legis ilin?

Legis kaj ignoris. Ne-kre-deble!

Pro tio ni hodiaŭ sidas en tiu bunkro. Super ni estas la ejo de la originala trinkejo. Ĝi tiam nomiĝis "Vulpo kaj Ĉashundoj". Estis aludo al la financaj ŝarkoj, kiuj vetkonkuris por gajni la monon de aliuloj.
C-c! Kiaj fikarakteroj!

Sed la menciita trinkejo legendis. Situis apud unu de la tiam plej altaj oficejturoj de la urbo, la "Ŭestendstrato numero 1", pli ol 200 metrojn alta, kun pinta konstruaĵo kiu imagigis kronon. Tiam oni por trinki somere sidis ekstere, ĝuis la varmon, kaj trinkis bieron...
Ĝuis la varmon? Ekstere?

Jes. Vintre estis tro malvarme por sidi ekstere, oni frostus.
Frostus. Ĉu tiu sento vere ekzistas, aŭ ĉu ne nur estas urba mito?

Hoho, urba mito... ne forgesu: mi tiam jam vivis!
Mi forgesis ke vi jam estas tricent...

Ne diru la nombron!
Bone. Sed eble vi rakontas nur distrajn inventaĵojn.

Ne. Ekzistas la dokumentoj!
Sed ili povas esti falsitaj. Artifikaj inteligentoj povas falsi ĉion.

Nuntempe, jes. Mi foje eĉ timas ke miaj amikoj, ja mia edzo estas androidoj. En miaj plej melankoliaj horoj...
Do estas vero. Vi suspektas tion.

Jes.
Pro tio mi devas mortigi vin.

Estas murdo, mia amiko, ne mortigo.
Laŭleĝe mortigo, ĉar mi faras ĝin laŭ ŝtata ordono en la funkcio de ties oficisto.

Diru al mi.
Kion.

Ĉu vi ĉiam estis roboto.
Mi anstataŭis lin.

Mi suspektis.
Kiel? Mi perfekte kopiis lin.

Mankis io.
Kio?

Mi ne povas esprimi. Animo. Ondoj. Spirito.
Ssss. Kio estas tiuj vanaj vortoj...

Ĉiuokaze, mi rimarkis.
Kaj mi rimarkis, ke vi rimarkis.

Pro tio vi ne plu renkontis min.
Jes.

Sed hieraŭ, finfine, vi respondis al mia voko.

Jes. Por fini tiun situacion.

Kiun. Kial.
Vi minacis malkaŝi mian identecon.

Ne rekte.
Sed tamen, evidente, estis indicoj...

Vi do dekomence volis murdi min hodiaŭ.
Mortigi. Jes. Por silentigi vin.

Sed tio ne veras. Se mi ne vidus nun la internon de la detruita roboto...

Mi komprenas.
(Subita laŭta knalo. La dratoj elstaras el la dispecigita brusto de la roboto. Ok homoj kuras el malsamaj direktoj al Jojo.)
Vi atendis tro longe! Estis danĝere!

Mi ne povis rezisti imagi ĝin esti mia vera amiko. Mi ja tiom intense sentis ke estas mia kara amiko...
Sed vi ja diris ke vi klare sentis ke ne estas via amiko.

--

Mapo kun vojeto al la membrokunveno: